

friponaĵon, ĉar alie vi certe estus subskribinta la paperon kiel honestulo.”

Sekvis universala akklamado. Oni ja sentis ke tio estas la unua vere sprita diro, kiun la Reĝo diris dum la tuta tago.

“Tio pruvas ke li estas kulpa” diris la Damo.

“Ĝi pruvas nenion” diris Alicio. “Vi ja ankoraŭ ne scias ĉu la versaĵoj eĉ rilatas la nunan aferon.”

“Legu ilin” la Reĝo ordonis.

La Blanka Kuniklo almetis siajn okulvitrojn.

“Kie vi volas ke mi komencu?” li demandis.

“Komencu ĉe la komenco,” diris la Reĝo solene, “kaj daŭrigu ĝis vi venos al la fino; kaj ĉe la fino ĉesu legi.”

Jen la versaĵoj kiujn la Blanka Kuniklo legis:

*Li diris ke vi vidis ŝin
Kaj nomis min ĉe li, ho!
Ŝi laŭdis min (atentu ĝin)
Sed ne pri la talio.*

*Anoncis li ke restos mi
Ĉi tie—ni ĝin sciis.
“Se la aferon puŝos ŝi,
Ho ve al mi” vi kriis.*

*Al ŝi nur unu, du al li
Tri, kvar al ni li donis!
Sed ĉiuj venis re al vi
Li tion ne oponis.*

*Se mi aŭ ŝi en tio ĉi
Kulpiĝus, li tre fida*

*Ke igos nin liberaj vi
Kiel nin vi nun vidas.*

*Supozis mi ke estis vi
Malhelpe al la planoj
(Dolor' vi for! ekkriis ŝi)
De ni kaj ĝi—pri ranoj.*

*Ne sciu li pri ŝia ŝat';
Ĉar tiu devas esti
Sekreta—kiel diplomato!
Ĉu vi ne volas resti?*

“Jen la plej grava evidencaĵo kiu aŭskultis” diris kontente la Reĝo, “si la manojn. “Nun do la ĵurintoj

“Se iu el ili povos klarigi ĝin, —ŝi en la lastaj minutoj tiom ĝis jam ne timis interrompi eĉ la Reĝon. “mi donacos al li ses pencojn, mem kredas ke enestas en ĝi eĉ da racia signifo.”

Ĉiuj ĵurintoj elskribis sur la afero kredas ke enestas eĉ ne unu ero de neniu el ili, malgraŭ la oferita klarigi la versojn.

“Se enestas nenia signifo” diris ja ŝparos al ni multe da ĝeno, ĉar bezonas serĉi. Tamen, mi ne eĉ daŭrigis, etendante la versojn sur kritike per unu okulo rigardante malgraŭ ĉio komencas trovi en ili ‘Sed ne pri la talio.’ Nur riga